



## Z-METIEJO EN GUANTÁNAMO

TIRSO ENRIQUE ÁVILA BORY

Nia tradicia jarfina renkontiĝo okazis por la 18a fojo ĉi-jare de la 12a ĝis la 15a de decembro kaj entute estis 62 partoprenintoj el 8 provincoj: Pinar del Río (2), Havano (5), Cienfuegos (6), Villa Clara (2), Holguín (4), Granma (7), Santiago de Cuba (5), Guantánamo (30) kaj estis tre agrable havi gaston el Brazilo.

La forveturo al la kampadejo Jakabo okazis je la 2a ptm. Ni alvenis, pretigis la loĝadon kaj post la vespermanĝo okazis la tradicia Interkona Vespere dum kiu prezentiĝis videofilmoj pri la ĉi-jaraj IJK (Fortalezo, Brazilo) kaj UK (Bonaero, Argentino), alia pri la 15a Datreveno de nia aranĝo, pri ekologia turismo en Baracoa kaj fine, la jam kutima interkonatiĝo de la partoprenantoj.

Kelkaj malfacilaĵoj konspiris kontraŭ la programo, ekzemple dum la unua tago okazis tuttaga elektrotranĉo, ĉiamaniere oni serĉis solvojn kaj la situacio plimalpli estis savita, kaj tiel ni havis la prezenton de Yumeiho-terapio flanke de Fráncel Briel. Posttagmeze, dum la gejunuloj kunvenis por diskuti siajn aferojn, vizitis nin infana rondo de la loka lernejo, Amantoj de la Naturo, kiuj povis interŝanĝi kun la partoprenantoj.

Ankaŭ radioamatoroj komencis siajn laborojn frue en la tago, feliĉe ili entute ne bezonis elektron ĉar ili disponis pri baterio, kiu garantiis al ili sufiĉan energion por la laboro.

Vespere ni festis kaj partoprenis diversajn ludojn, ankaŭ karaokeo estis tre amuza.

Sabate matene okazis du laborkunsidoj. Albania Duthil prelegis kaj la partoprenintoj kundiskutis la manieron disvastigi Esperanton en sia loĝloko. La alia aranĝo estis konkurso pri literumado de E-vortoj, kiun konkurson gajnis Ángela Villavicencio, el Santa Clara, kiu ricevis libropremion. Posttagmeze okazis kunveno kie oni pridiskutis diversajn temojn rilate organizon de E-aranĝoj. Post la vespermanĝo Leonardo Luna prelegis pri la loka historia centra bazaro; Tirso prelegis pri ĉokolado kaj Roberto Cutiño instruis ekspresan kurson. En la arta vespero loka muzikgrupeto kun Joel Brooks, Lisandra González, Tania Laurencio kaj Fermín Duany, regalis nin per E-kantoj, ni atendis la noktomezon por omaĝi la naskiĝtagon de Zamenhof, kaj ĝis frumateno dancis kaj drinkumis. Dimanĉe matene, la 15an de decembro, oni fermis la aranĝon.

*Karaj, tiu ĉi estas la lasta numero de la jaro. Bedaŭrinde ni ne povis raportii pri ĉiuj jarfinaj aranĝoj okazintaj en la lando, eĉ ne pri tiu organizita en la Nacia Sidejo de KEA, simple, ĉar mankis spaco. Tamen, ni promesas rekompenci vin per pli ampleksa numero aperonta por la Kuba E-Renkontiĝo (Viñales, Pinar del Río, 2014).*

*Ni daŭre kalkulas je viaj kontribuajoj. Bv. konscii pri tio, ke la diskonigo de viaj sukcesoj spronas la interŝanĝon de ideoj kun aliaj grupoj kaj filioj, kiuj tiel povas realigi similajn projektojn.*

*Laŭ Alekso ĉi-numere: la plenumo de la asociaj celoj dependas de ni. Kreski kvante kaj kvalite estas ĝuste unu el ili.*

*La nova jaro estas promesplena. Nun restas nur agi.*

*Ek!*

**KIU ESTAS KIU INTER NI**

## NIAJ HONORAJ MEMBROJ (II)

### Raúl Juárez Sedeño

Juan Ramón RODRÍGUEZ GÓMEZ

Veninte el malnova esperantista familio de Camagüey,\* Raúl Juárez Sedeño ekkomencas memlerni la lingvon en 1942, helpe de libroj el la hejma biblioteko. En 1950, li aliĝas al la tiama Kuba Esperanto-Asocio (fondita la 11an de junio 1948) kiel Invitita Membro kaj sep jarojn poste fariĝas individua membro de UEA.

En februaro 1958, Juárez publikigas sian unuan propagandan artikolon en la loka gazeto *Superación*; kaj en majo, estas nomata UEA-peranto en Kubo. Unu jaron poste li malfermas en Camagüey Kuban Esperanto-Oficejon kaj ĝianome subskribas plurajn leterojn al ŝtataj instancoj kaj amaskomunikiloj rilate la gravecon de tiu ĉi lingvo, laboro kiun li daŭrigas en la sekvaj jaroj.

Kiel parto de intensa propaganda agado, en aprilo 1961, li finas la tradukon de la *Unua Havana Deklaro*, grava socipolitika dokumento de la nova epoko, aprobita de la kuba popolo, kiun li sendas al intelektuloj, kulturaj institucioj kaj al la landa gazetaro.


La unua rezulto el tio ĉi aperas tuj poste, kiam pluraj homoj en Camagüey interesiĝas pri la lingvo, al kiuj Juárez instruas E-kurson ekde februaro 1962. En decembro, *Bulgara Esperantisto* publikigas lian tradukon de *La pequeña balada de Plovdiv* (Malgranda balado de Plovdiv), verkita de la kuba Nacia Poeto Nicolás Guillén.

La plej gravaj rezultoj aperas en 1963. Komence de tiu ĉi jaro, Juárez kaj liaj gelernantoj entreprenas plurajn demarŝojn en la lando kaj internaciskale, celante havigi la plej diversajn materialojn por munti grandan E-ekspozicion en Camagüey. Interalie, ili kontaktas kun tre konataj esperantistoj el Havano, kiel Antonio Alemán Ruiz, kiu estris la kuban movadon 1910-1955, kaj havis ampleksan kolekton da diverstipaj esperantaĵoj.

Pro la abunda diskonigado de informoj far la tutlanda gazetaro, antaŭ, dum kaj post la ekspozicio, la kolektivo gvidata de Juárez Sedeño sukcesas okazigi ĝin de la 14a ĝis la 21a de julio. Oni montras tie du gravajn lokajn simbolojn por la estonteco: propraj standardo kaj flago de Esperanto ĵusfaritaj.

Rekte el tio fontas la naskiĝo de la Grupo Esperantista de Camagüey, kiu fondiĝas en septembro, kun la jam ekzistantaj esperantistoj en tiu urbo kaj aliaj 60 interesitoj lerni la lingvon, al kiuj Juárez tuj komencas instrui kurson.

La sukceso de la kurso kaj la entrepreno de aliaj taskoj ebligas la alvenon de novaj projektoj, kiel vizito de Juárez, kun du aliaj lokaj esperantistoj el Camagüey, al Alemán Ruiz kaj aliaj malnovaj aktivuloj en Havano (18-20 januaro 1964), organizo de alia



Raúl Juárez Sedeño  
(Camagüey,  
1926.10.02-2012.06.04)

\* Raúl Juárez Sedeño estas filo de Jorge Juárez Cano (unu el la plej elstaraj membroj de la tiama tutlanda asocio, lerninta la lingvon 1911 en Nuevitás, UEA-delegito de 1922 ĝis la fino de la tridekaj jaroj), nevo de Pedro Juárez Cano (kiu esperantistiĝis komence de la dua jardeko kaj estis aktiva esperantisto loke – en urbetoj Piedrecitas – kaj naciskale), frato de Jorge Juárez Sedeño (historiisto de Camagüey ekde la 50aj jaroj) kaj onklo de Héctor Juárez Figueredo, ĵurnalisto kaj filatelisto, kiu multe verkis kaj propagandis pri la IL, en la 70aj kaj 80aj jaroj).

ekspozicio (22-30 aŭgusto), malfermo de novaj kursoj en la sekvaj jaroj, ktp, ĉiuj sukcesintaj.

Tiel, la agado de Juárez reprezentas ligilon inter la unua epoko de Esperanto en Kubo kaj la novaj tempoj, el kio venas novaj grupoj en Ciego de Ávila, Florida, Santiago de Cuba, Güines kaj Havano, ĝis la fondo de la nuntempa Kuba Esperanto-Asocio (KEA), la 16an de junio 1979.

Pri Juárez ankaŭ menciendas, ke la 30an de novembro de tiu jaro, ekfunkcias en Havano la Komisiono pri Historio de Esperanto en Kubo, gvidata de li, kiu tuj entreprenas plurajn esplorojn en tiu direkto; en 1987, KEA nomas lin Honora Membro, kondiĉo aldonata ankaŭ far UEA en 1990.

Post novembro 1989, kiam KEA nomas novan komisiiton pri Historio de Esperanto en la lando, li daŭrigas siajn esplorojn kaj kontribuas al tiu tasko per diversaj dokumentoj el sia propra kolekto, parte ricevita de sia patro. Nuntempe, pluraj materialoj ekzistantaj en nia Arkivo pri Historio venis subskribitaj de Raúl Juárez Sedeño, al kiu hodiaŭ mi dankegas per tiu ĉi artikolo.


#### Bibliografio

[FETTES, MARK]: "Pioniroj el tri kontinentoj" [Honoraĵoj de UEA], en *Esperanto*, 83-a jaro, n-ro 1019 (11), novembro 1990, Rotterdam, p. 213.

GONZÁLEZ SANTILLÁN, JORGE LUIS: *Historia del Movimiento Esperantista en Camagüey*, Asociación Cubana de Esperanto, Camagüey, 1997

[BULLER, OSMO]: "Forpaso", en *Esperanto*, 104-a jaro, n-ro 1262 (10), oktobro 2012, Rotterdam, p. 214.

RODRÍGUEZ GÓMEZ, JUAN RAMÓN: *El Esperanto en Cuba*, t. 1 (1904-1973), Havano, 2013 (ne eldonita).



Dum la unua Esperanto-Ekspozicio en Camagüey (14-21 julio 1963). La tria de maldekstre, Raúl Juárez Sedeño, apude Roberto Guerra Ibarra, estro de la grupo de Santiago de Cuba; maldekstre, du gravaj esperantistoj de Camagüey: Víctor Varona Montalván kaj Fermín Piedra Olivera. (Foto transdonita de Montalván al Pedro P. Lamas, en 1967).

## RAYMOND SCHWARTZ: la humoristo de nia movado

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

“El ĉio ĉi ni rajtas konkludi: ĉar la nunepokaj aktualaĵoj estas malagrablaj, sekve ĝenaj por nia sano, ŝajnas pli saĝe konsumi ilin nur malvarmaj, ni diru kun trimonata malfruo.”

Tiujn ĉi vortojn vi povas legi en teksto verkita de Raymond Schwartz de antaŭ pli ol 40 jaroj kiu temas “Pri la higiena valoro de Esperantaj gazetoj”, publikigita de la eldonejoj TK-Stafeto en 1972 gviditaj de Torben Kehlet kaj Juan Régulo.

La teksto estas plena je pikaj kaj humuraj eldiroj kiuj montras la talenton de Schwartz por krei kaj rekrei tia-specajn historiojn jen proze jen verse. Li estas konata kiel elstara humoristo de la Esperanto-movado.

Raymond Schwartz, estis franco, bankoficisto kiu naskiĝis la 8an de aprilo 1894 en Metz, kie li fondis esperantistan grupon en 1913. Pli poste, en 1920 li gvidis dum kelkaj jaroj la faman Esperantan kabareton “Verda Kato” en Parizo, kie famiĝis pluraj tekstoj verkitaj de li, ofte el realaj okazintaĵoj kiel ekzemple la edziĝo de fama aktoro Sacha Gitri en 1949, la kvina edziĝo farita laŭ greka-ortodoksa rito; jen fragmento de versa teksto prezentita en tiu fama kabareto:

*Kvin fojojn vi edziĝis. Naskiĝus nur enuo  
El tia ripetado, se vi al la menuo  
Ne donus novan saŭcon, kaj sekve, sen hezito  
Vi iras al la festo laŭ ĉiam nova rito:*

*Komence, sen altaro, profane kaj laike,  
Sed poste pli solene, korekte-katolike,  
Hierau, primokante filistran paradokson,  
Senĝene vi akceptis la grekan ortodokson;*

*Vi morgaŭ submetiĝos – kondiĉo de la beno! –  
Al operacieto sub mano de rabeno;  
Postmorgaŭ, kun konvinko, sub kiu ajn reĝimo,  
Vi pretos ree roli en nova pantomimo,*

*Egale, ĉu lutere, korane, vegetare,  
Ĉio finiĝos same: teatre kaj husare!  
Ne gravas, kiu rito – viciĝos kun bonvolo  
Pastoroj, pastroj, popoj en via farandolo.*

*Nur unu restos firme en gamoj de l' vario:  
Neniam vi forgesas pasi ĉe l' notario...*



La alia tre konata verko estas la titolita kolekto ... *kun siaspeca spico!*, eldonita en 1972, kiu enhavas prozajn kaj versajn humuraĵojn originalajn, plus 20 kronikojn titolitajn “Laŭ mia... ridpunkto”, sinsekve aperintajn dum 20 jaroj en *Sennacieca Revuo*.

El tiu kolekto mi prezentas al vi tekston kiu montras la talenton de nia Esperanta humoristo kiu bele ludas per la vortoj kaj igas nin miri pri la unikaj trajtoj de la lingvo por krei tiom mirigajn tekstojn indajn je nia ĝuo kaj disvastigo. La versaĵo estas titolita “Progreso”:

*Adamo kaj Evo estis solaj sur la Tero. Kaj tamen, unu tagon – neniu scias, de kie – venis tria homo. Li estis viro. Videble. Kaj li diris al Adamo: “Mi tre dezirus pasigi unu duonhoron kun via edzino. Ĉu vi bonvolas doni ĝin al mi?”*

*“Doni? – miris Adamo. Doni? Certe ne! Sed, se temas nur pri unu duonhoro, vi povas lui ŝin”.*

*“Lui ŝin? Jen bona ideo! – ekĝojis la tria homo, kaj kun plezuro li konstatis:*

*Kiel simple kaj senkonflikte! Jam komenciĝis la progreso!*

*Jes, konkludis Adamo, “progreso dank’ al... Evo-luo!”*

La homo kiu kreis la verkon ...*kun siaspeca spico!* indas je nia honoro kaj plia disvastigo de lia arto. Ĉu vi pretus legi ĝin?

### Alexander Dumián Martínez Agüero, Bayamo, Granma Kion mi faras por Esperanto

- ★ Mi ĉiutage lernas kaj aktivas.
- ★ Ĉiusemajne mi instruas en mia loĝurbo kaj korespondas nacie kaj internacie.
- ★ Sukcese trapasis la bazan ekzamenon de KEA en 2013.
- ★ Membras en UEA, SAT kaj ILEI.
- ★ Verkas por bultenoj en Brazilo, Urugvajo, Hispanio kaj Aŭstralio.

- ★ Danke al la helpo de eksterlandaj samideanoj mi studas rete en programo de la Internacia Akademio de Sciencoj AIS-RSM/Meksiko.
- ★ Mi faris la Bazan kaj la Mezgradan Ekzamenojn de AIS, kaj mi trapasis ilin kun bonega rezulto. Mi preparas min nun por trapasi la Superan Ekzamenon de AIS kaj atingi la

Atestilon de Supera Nivelo de Esperanto-Kono.

- ★ Mi opinias, ke la estonteco de Esperanto estas respondeco kiu troviĝas sur niaj ŝultroj.
- ★ Mi esploras kaj preparas prelegojn pri diversaj temoj.
- ★ Mi estas prezidanto de Provinca Filio Granma, kaj prizorgas publikajn rilatojn kaj instruado.



## ESPERANTO TRA LA ETERO

Guillermo NAVARRO TOLEDANO (CO8WG)



*Dum elsendoj en la Kampadejo Yacabo Abajo, Guantánamo, de maldekstre, Orlenis Leiva CL8OLR (Imías), Roberto Rivas CO8RH (Guantánamo) kaj Heberto García CL6HG (Cienfuegos). Foto: Javier Ramos Nistal CL2MM (Havano).*

Tradicie en Guantánamo oni festas la naskiĝtagon de Ludoviko Zamenhof, kreinto de la Internacia Lingvo.

De la 12a ĝis la 15a de decembro 2013 la kampadejo Yacabo Abajo, 6 kilometrojn for de Imías akceptis la amantojn de la lingvo Esperanto.

Temis pri la 18a Zamenhofa Metiejo dum kiu okazis speciala radioamatora aranĝo. Aro da radioamatoroj partoprenis la Esperantan etoson kaj dum preskaŭ kvar tagoj okazigis specialan elsendon per kiu la Esperanta aranĝo vojaĝis tra la etero.

Dum la renkontiĝo okazis ankaŭ aranĝo kun infanoj loĝantaj proksime de la kampadejo.

Ĉeestis la membroj de KLERA Guillermo Navarro CO8WG; Javier Ramos CL2MM kaj Heberto García CL6HG; krome ĉeestis lokaj radioamatoroj, kiuj fariĝis membroj de KEA kaj nun jam lernas Esperanton. Inter ni estis el Guantánamo Roberto Rivas CO8RH, kiu kunportis siajn radioelsendilojn kaj fakajn konojn, Orlenis Leiva CL8OLR el Imías, Alfredo Hernández CL8GAH kaj Miladys Valdes CL8GMV.

Ni kontaktis 66 radiostaciojn en VHF (tre alta frekvenco) kaj proksimume 30 HFajn (alta frekvenco) radiostaciojn. Pro la rezultoj, la Filio en Guantánamo kaj KLERA interkonsentas ripeti tion en la jaro 2014. Ni sendis QSL-kartojn kun informoj pri KEA kaj Esperanto al ĉiuj radioamatoroj, kiuj kontaktis nin. Notindas ke en la retejo de la Kuba Federacio de Radioamatoroj (FRC) [www.frc.co.cu](http://www.frc.co.cu) aperis du artikoloj pri la aranĝo.

Guillermo Navarro Toledano, CO8WG

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
[info@esperanto.cu](mailto:info@esperanto.cu)  
[www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu)

esperanto  
CUBA

KEA

**Kuba Esperanto-Renkontiĝo**  
Kampadejo Dos Hermanas  
Viñales, Pinar del Río  
12-16 marto 2014



**RADIO HAVANO KUBO**  
Kurtondaj kaj retaj elsendoj  
[www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo)



[esperanto.cu](http://esperanto.cu) estas trimonata bulteno sendita al komitatoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). **Redaktis:** Alberto F. Calienes, Maritza Gutiérrez kaj Javier Ramos. **Enpaĝigis:** Alberto F. Calienes

esperanto  
CUBA